

**DIA REGNO**  
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

• dumonata kristana revuo en esperanto • n-ro 1 (964) • 2024 •



La markemblemo de  
nia ĉi-jara kristana  
kongreso en Vác,  
Hungario

Legu pri Visegrád (paĝo 19), ekskurscelo  
dum la ĉisomera kristana kongreso en Vác

La reĝa palaco en Visegrád

Foto de [visitvisegrad.hu](http://visitvisegrad.hu)



## KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia  
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Philippe Cousson

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,  
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;  
☎ +33 (0) 549468021; 📧 philippe.cousson@sfr.fr

**Sekretario:** Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,  
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio  
☎ +420 723 672 335;  
📧 polnickypavel@seznam.cz

**Kasisto:** Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,  
HU 1072 Budapest, Hungario  
☎ +36 302 000 306;  
📧 agnes@raczkevy-eotvos.com

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale': CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;

IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon [www.chez.com/keli/](http://www.chez.com/keli/)

## DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908  
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

**Redaktoro:** Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 54 Hässleholm; Svedio  
☎ +46 70 2004574; 📧 dr\_board@yahoos.se

**Kontrollegis:** Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.*

**Ekspedado:** Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio. 📧 info@astroprint.cz

**Eldonmonatoj:** meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

## Enhavo

Gvidistino	3
Adaptado de romaoj – dornoplana vojo	6
Dek helpoj — pri la Dekalogo, oka ordono	12
Kontrasto de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo aŭ aliaj religioj	16
La kastelo en Visegrád	19
La rolo de manĝaĵo en niaj vivoj	21
Informetoj	23
Kanto: Sonu gloro tra l' aer'	24

## Redaktoraj vortoj

**K**ara leganto, denove kaj denove mi estas iel atentigita pri la graveco, ne nur ĝuo, legi literaturon. Eble la unua konscia fojo estis, kiam iama pastoro diris al mi, ke li lernis pli pri homoj, iliaj pensoj kaj reagoj, el literaturo kaj ne pro sia teologia eduko. La ĝis nun lastaj fojoj okazis post novjaro, kiam du literaturamaj homoj, preskaŭ samtage, tre klare evidentigis al mi, ke ili el la literaturo bone ekkonas homan naturon. Ne temas pri teorioj, sed kolektitaj homaj spertoj, kiuj en agrabla formo estas transdonitaj de lertaj verkistoj al la legantoj.

Je alia flanko mi okupiĝas pri postlasitaj libroj de kelkaj homoj, precipe esp-a literaturo. Kiom da libroj ni havas en nia lingvo! Kiom da laboro estas enmetita en tiuj libroj, aŭ originale verkitaj aŭ tradukitaj! Kia riĉeco!

Mi certas ke ni povus pli bone uzu tiun riĉecon. Legu kaj raportu al DR!

Fine, se vi jam ne aliĝis al la kongreso sed ŝatus partopreni – vi trovas informon kaj aliĝilon ĉe: [keli.chez.com/](http://keli.chez.com/).

26 En la sesa monato Dio sendis la anĝelon Gabriel al urbo en Galileo, kies nomo estis Nazaret, 27 al virgulino fianĉigita al viro kiu nomiĝis Jozef, el la domo de David. La nomo de la virgulino estis Marjam. 28 Li eniris kaj diris al ŝi: Saluton, gracoplenigita, la Sinjoro estas kun vi. 29 Ŝi plene konfuziĝis pro tiu diro, kaj sin demandis, kion signifas tiu saluto. 30 Sed la anĝelo diris al ŝi: Ne timu, Marjam: ĉar vi trovos gracon ĉe Dio. 31 Vi gravediĝos kaj naskos filon. Vi nomos lin Jesuo. 32 Li estos granda kaj nomiĝos filo de la Plejalta, kaj Dio la Sinjoro donos al li la tronon de lia patro David, 33 kaj li reĝos pri la domo de Jakob ĝiseterne. Lia reĝeco ne havos limojn. 34 Diris Marjam al la anĝelo: Kiel estos tio ĉi? Mi ja ne seksuniĝis kun viro. 35 La anĝelo responde diris al ŝi: Sankta spirito venos sur vin, kaj forto de la Plejalta superombros vin. Tial kio naskiĝos, nomiĝos sankta, filo de Dio. 36 Krome, via parencino Elisabeta en sia oldeco ankaŭ gravediĝis, kaj jam estas la sesa monato por ŝi, kiun oni nomis malfekunda. 37 Ĉar por Dio nenio estas neebla. 38 Diris Marjam: Jen la sklavino de la Sinjoro: okazu al mi laŭ viaj vortoj. Kaj la anĝelo forlasis ŝin.

Luko 1:26–38 (traduko laŭ G. Berveling)

**K**araj gefratoj, nu, kial Gabriel, tiu ĉi mesaĝisto sendita de Dio, venis tiutempe al ĉi tiu urbeto en Galileo? Kial li revenis, vizitinte Danielon, laŭ la samnoma libro, por klarigi al li viziojn, por doni al li parolon?

Kial, jam antaŭ iom da tempo, li venis por vidi la pastron Zeĥarja, ĉu ne, por paroli kun li, por diri al li bonan novaĵon.

Gabriel, laŭ sia nomo, estas la forta homo de Dio. Sed lia potenco troviĝas en liaj paroloj, en la mesaĝo, kiun li portas.

Li estas sendita, li estas en misio, li estas apostolo. Li estas anĝelo, tio estas, mesaĝisto.

Kaj ĉi-foje, li parolas kun Maria, virino promesita en geedziĝo.

Ĉi tiu virino ricevos parolon de li.

En diversaj tradukoj kio sekvas ne nepre estas evidenta. Du radikoj estas uzataj en ĉi tiu peco, kun tre proksima signifado, preskaŭ sinonimoj, λογος (logos) kaj ρημα (rhēma), kies signifado estas parolo, kompreneble, sed ankaŭ afero,

ago. Tio ankaŭ estas la kazo por la hebrea ekvivalento רבך (davar). La parolo portata de la mesaĝisto enhavas en si sian efikecon, ĝi estas performa, ĝi atingas tion, kion ĝi diras. Estas ĉi tiu sama parolo kiu kreis la mondon. Estas ĉi tiu sama parolo, kiu savas. Jen kio estos anoncita al la paŝtistoj: Naskiĝis al vi Savanto.

Vera konversacio okazas inter Maria kaj Gabriel. Ĉiu diras tion, kion ili devas diri. Ankoraŭ la parolo.

La unua parolo de Gabriel ĝenas Maria, kaj provokas ŝian demandadon. Ĉi tiu parolo kaj ĉi tiu demandado laŭvorte pasas tra ŝi, kiel indikas la sama prefikso.

Oni povas ankaŭ demandi sin, kiel ŝi komprenas tiun ĉi trioblan mencion pri graco, pri la favoro al ŝi atribuita: en la saluto (Ĝoju, ĝi estas la sama radiko), en la graco, kiu estas donita al vi, en la graco, kiun vi trovis.

Se ŝi ne tuj komprenas ĉion, Maria bonvenigas ĉi tiun gracon, akceptas ĝin, lasas sin trairi de ĝi.

Ĉi tiu parolo koncernas Maria, sed ĉefe ĝi koncernas ŝian Filon, Jesuon, kaj per li Izraelon kaj ĉiujn homojn.

Kiam ni parolas pri la pezo de la parolo, la pezo de la vortoj, ni ne devas forgesi ankaŭ la pezon de la nomoj. En ĉi tiu mallonga peco, la evangeliisto Luko nomas: Gabrielo, Nazareto, Jozefo, Davido dufoje, Maria 4-foje, Jesuo, Jakobo kaj Elizabeto. En ĉi tiu mallonga peco, la verbo voki estas uzata 4 fojojn kaj la vorto “nomo” 4 fojojn same. Indiki, voki, nomi, estas ankaŭ atribui valoron, signifon, gravecon al homo, urbo. Ni ne estas ĉi tie en la “iam ie”.

Tiu ĉi teksto situigas nin en specifa tempo, en specifa loko, kun specifaj homoj por specifa momento en la

historio, en la historio de la mondo, en la historio de ĉi tiu regiono sed ankaŭ en la historio de la tuta mondo, de la tuta homaro, en la historio de la tuta universo.

Ĉi tiu momento de la enkarniĝo de Dio, de la filo de la Plejaltulo, estas tiel decida kiel tiu de la kreado de nia mondo, de nia universo.

Ĝi estas la nodo de ĉiuj tempoj kaj lokoj.

Lia regado, tiu de la naskota filo, ne havos finon, sed estus necese traduki per “ĉiuj eonoj”, tio estas ĉiuj tempoj kaj ĉiuj lokoj, ĉiuj universoj.

Ĝi estas momento, kiun ni povus priskribi per astrofizika aŭ sciencfikcia vortprovizo kiel vermtruon inter mondoj, kiam nia universo, nia spactempo estas renkontata de la universo, la tute alia realo de Dio, kiam Dio intervenas.

Ĉi tiu renkontiĝo de Gabrielo kaj Maria markas la komencon de esenca tempo en la historio de savo. Ĉi tiu graco donita al Maria estas poste transdonita al la tuta homaro kaj eĉ al la tuta Kreo.

Ni konas la ceteron de ĉi tiu rakonto. La Evangelioj rakontas al ni iom pri la vivo de Jesuo, rakontas liajn parolojn, liajn agojn kaj lian morton kaj atestas pri lia releviĝo. Tiam la apostoloj priskribas al ni la komencojn de la Eklezio, de tiuj, kiuj estas vokitaj, vokitaj al savo kaj vokitaj al atesto kaj raportas la agojn de la Sankta Spirito.

Ĉar ĉi tiun parolon, ĉi tiun efikan parolon de la anĝelo, ni devas reeĥi. Ni devas permesi al ĝi trapasi nin. Ni devas bonvenigi la gracon, la favoron de Dio. Maria kaj Elizabeta prenis, ricevis, bonvenigis la infanon, kiun ĉiu portas. Jen la signifo de la parolo foje tradukita kiel “gravediĝi” aŭ “koncipi”. Sammaniere, ĉu ni estas en preta stato, ĉu ni pretas akcepti,

akcepti ĉi tiun Jesuon, ĉi tiun Filon de la Plejaltulo? Kio estas nia rilato kun li? Ĉu li estas por ni tre proksima persono, intima persono? Aŭ male ideo, rolanto, fremdulo?

Ĉion, kion Maria, la disĉiploj, la apostoloj spertis apud Jesuo, ili volis konigi al ni. Ĉi tiun parolon, kiu trapasis ilin, ĉi tiun gracon, ĉi tiun favoron, kiu ŝanĝis ilian vivon, ili volis transdoni, plusendi, kaj tra la jarcentoj, ĝi atingis nin. Kion ni spertas kiel kredantoj, kiel disĉiploj, kiel atestantoj, estas ankaŭ tio, kion ni devas transdoni, estas la parolo, pri kiu ni devas raporti, estas la graco, per kiu ni devas saluti tiujn, kiuj estas ĉirkaŭ ni.

Se foje la disĉiplo, la atestanto parolas pri si mem, ne estas por paroli pri li, tio estas por paroli pri la alia, pri tiu, kiu aliĝis al li, kiu lin vokis, pri Jesuo, Savanto, Mesio, Sinjoro, kiel la anĝeloj proklamis al la paŝtistoj.

Ekzistas familio de ortodoksaj ikonoj reprezentantaj Maria kaj Jesuon nomitan ὁδηγήτρια (hodêgêtria), la “gvidistino” Sur ĉi tiu ikono ni trovas Maria, tenante la infanon Jesuo sur ŝia maldekstra brako kaj per sia dekstra mano ŝi montras lin. Tiu, kiu estas plej grava, tiu al kiu ni devas alparoli, ja estas ĉi tiu infano, li estas la Filo de la Plejaltulo. La objekto de fido estas nur Jesuo.

Ĉi tiu Jesuo, la Kristo, la Savanto, la Sinjoro, estas la subjekto kaj la objekto de ĉi tiu efika parolo, de ĉi tiu parolo, kiu atingas nin, kiu trairas nin, kiu nin ĝenas, de ĉi tiu parolo, kiun ni akceptas, de ĉi tiu



Philippe Cousson, prelegante en Bjalistoko

parolo de kiu ni rakontas per niaj paroloj, per niaj gestoj, per niaj agoj.

Jes, kompreneble ni foje estas mal-lertaj pri tio. Ni memoru, ke ankaŭ graco estas donata al ni, akirita, sen merito, sen brido.

La frazo ofte tradukita kiel: “Nenio estas nebla ĉe Dio” ankaŭ signifas “La parolo de Dio ne malsukcesos”. Mi memorigas al vi, ke *rhêma*, uzata ĉi tie, signifas, same kiel *logos* kaj parolon kaj aĵon.

Kaj kial ne okazu, ke ni ne nur respondecas pri proklamado de ĉi tiu parolo, sed ankaŭ pri plenumo de ĝi?

“Kiel tio okazos, ĉar mi ne taŭgas por ĉi tio, mi ne estas preta por ĉi tio?”

“La Sankta Spirito venos sur vin, kaj la potenco de la Plejaltulo superombros vin.”

Amen.

# Adaptado de romaoj – dornoplana vojo

Prelego dum la Kristana Kongreso en Bjalistoko, 2023

Oldřich Arnošt FISCHER, CZ

*O Del tut kamel, o Del man kamel,  
le ĉhas amen dinja, amaro Del.  
Som manuŝ baĥtalo, o Del man kamel,  
o Del man kamel, baĥtalo som.  
Leskero gulo lav, andre miro jilo lav,  
the man viĉindja amaro Del.*

Dio amas vin, Dio amas min,  
li oferis por ni sian filon, nia Dio.  
Mi estas feliĉa homo, Dio amas min.  
Dio amas min, mi estas feliĉa.  
Lia dolĉa vorto, la vorto por mia koro,  
ankaŭ min nia Dio vokis.

El romaa religia kanto, kiun romaoj kantadas en vilaĝo Rankovce (Slovakio)

## Ciganoj aŭ romaoj?

Se mi parolas aŭ skribas pri romaoj, oni min ofte demandas, kial mi uzadas nomon “romao” anstataŭ la nomo “cigano”. Ja mi ankaŭ antaŭ multe da jaroj parolis nur pri ciganoj. En romaa lingvo (romanji ĉhib) *rom* signifas viro kaj *romnja* signifas virino.

Kiam en la jaro 1968 en socialisma Ĉeĥoslovakio iomete pliboniĝis politika situacio, en Slovakio romaoj fondis Asocion de Ĉeĥoslovakaj Ciganoj (*Zváz ĉsl. Ciganov*), poste Asocion de Ciganoj-Romaoj (*Zváz Ciganov-Romov*) kaj en Moravio kaj Bohemio oni fondis Asocion de Ciganoj-Romaoj (*Svaz Cikánů-Romů*). Ambaŭ romaaj asocioj sukcese kunlaboris, sed en la jaro 1973 kontraŭreformaj ĉeĥoslovakaj komun-istoj ambaŭ asociojn neniigis.

Romaoj neniam plene akceptis la nomon “ciganoj”, kiun al ili donis neromaoj. La 8an de aprilo 1971 dum la

unua Romaa Kongreso, kiu okazis en Orpington apud Londono, romaoj akceptis sian oficialan nomon romaoj, romaan himnon kaj romaan flagon, kiu estis proponita jam en la jaro 1933. Pro tio la 8a de aprilo estas Tago de Romaoj.



Oldřich Fischer, prelegante en Bjalistoko

En la jaro 1977 en Ĉeĥoslovakio romaoj fariĝis etna malplimulto. En nuntempa ĉeĥa lingvo la vorto “cigano” (*cikán*) havas ofendan signifon kaj oni ĝin toleras nur en historiaj tekstoj kaj nomoj (ekz. ciganino Carmen, cigana rostaĵo, kanto *Cikánka* / Ciganino).

### Deveno de romaoj

Kaŭze de malbonaj kondiĉoj en Hindio romaoj inter la 3a kaj la 10a jarcentoj en multaj ondoj migris trans Persio kaj Armenio al Nigra Maro. El Armenio unu malgranda romaa fluo eniris en nuntempan Ruslandon. Ĉefa fluo transiris markolonojn Bosporo kaj Dardaneloj kaj trans Balkano daŭris en Eŭropon, sed pli malmultenombra fluo iris el Malgranda Azio sudokcidenten kaj trans Proksima Oriento kaj norda Afriko alvenis en Hispanion. En mia lando, nuntempa Ĉeĥa Respubliko, la unuaj romaoj aperis en fino de la 14a jarcento. En la 16a jarcento jam romaoj estis en tuta Eŭropo, inkluzive de Grandbritio kaj Norvegio.

### Persekutado de romaoj

En Eŭropo oni nomadajn romaojn ne bonvenis, sed toleris. Ĉiu kampo, herbejo aŭ arbaro jam al iu apartenis. Nomadoj el oriento volis adaptiĝi, sed ne ĉiam ili sukcesis. Romaoj estis lertaj forĝistoj, plektis korbojn, konstruis fornojn, fabrikis kaldronojn, ŝlifis tranĉilojn, komercis per ĉevaloj, dresis kaj montris bestojn, precipe simiojn kaj ursojn, estis bonaj muzikistoj kaj dancistoj, sed krom tio ili ŝtelis, trompis kaj mensogis. En ĉeĥa lingvo ĝis nun ekzistas verbo *cigánit*, kiu signifas “mensogi kiel romao”.

Endanĝerigitaj nomadoj ofte devis el danĝera loko fuĝi en alian lokon, kie ili estis almenaŭ tempete en sekureco. Ĉiu komunumano, eĉ malgranda infano, havis sian taskon kaj sciis, kion fari, se la komunumo estas endanĝerita. Se proksimiĝis malamikoj, romaoj rapide pakis sian tendaron kaj senbrue malaperis.

En mezepoko oni romaojn torturis kaj ekzekutis (pendumis, dronigis, brulmortigis), en Aŭstrio plej multe dum regadoj de Leopoldo I Habsburga (1640–1705) kaj Karolo la VI Habsburga (1685–1740). Sed en aliaj landoj situacio ankaŭ ne estis pli bona. Ekzemple en la 18a jarcento en listo de predoj, kiujn ĉasis unu franca duko kaj liaj gastoj, estis krom cervoj, aproj kaj aliaj sovaĝaj bestoj menciitaj ankaŭ “unu pafmortigita ciganino kun ŝia suĉinfano”.

Romaoj tion neniam forgesis. Ĝis nun en ĉiuj landoj ili estas en opozicio kontraŭ neromaa majoritato.

Ĉeĥoslovaka Respubliko (1918–1939) sendube estis demokrata ŝtato, sed tie diskriminado de romaoj daŭris. Por romaoj oni eldonis specialajn “ciganajn identigilojn”, “nomadajn licencojn”, kaj malpermesis al ili eniron en banlokojn, ripozejojn kaj signifajn lokojn.

En najbara Germanio kvazaŭsciencistoj Robert Ritter (1901–1951) kaj Eva Justin (1909–1966) el Esplorinstituto por Rasa Higieno kaj Biologa Esplorado de Loĝantaro (*Rassenhygienische und Bevölkerungsbiologische Forschungsstelle*) subtenis rasismajn leĝojn. Kiam germanaj nazioj okupis restaĵon de Ĉeĥoslovakio (la 15an de marto 1939) kaj kreis tie Protektoraton Bohemio kaj

Moravio (*Protektorat Böhmen und Mähren*), ili baldaŭ ekpersekutis ne nur hebreojn, sed ankaŭ romaojn. Kun helpo de ĉeĥaj kaj moraviaj faŝistoj ili fondis barakarojn en Lety apud Písek (Bohemio) kaj Hodonín apud Kunštát (Moravio). Miloj da romaoj, inkluzive de virinoj, maljunuloj kaj infanoj, tie suferis en teruraj vivkondiĉoj kaj poste estis forsenditaj en eksterlandajn koncentrejojn, kie nazioj ilin mortigis. La duan mondmiliton transvivis nur 600 romaoj, kiuj antaŭ la dua mondmilito loĝis en Moravio kaj Bohemio.

### Post la dua mondmilito

Romaoj kaj sintoj (germanaj romaoj), kiuj loĝis en Bohemio kaj Moravio antaŭ la dua mondmilito, estis preskaŭ ekstermitaj. Baldaŭ ilin anstataŭis slovakaj kaj hungaraj romaoj, kiuj en postmilitan Ĉeĥoslovakion alvenis en kelkaj ondoj.

La unua ondo alvenis en la jaro 1945. Ĝi konservis siajn romaajn tradiciojn, lingvon kaj bone adaptiĝis.

La dua ondo okazis en la 50aj kaj 60aj jaroj en Slovakio varbita por laboro en Moravio kaj Bohemio. Peza industrio kaj konstruindustrio bezonis laboristojn. Multe da diversaj romaaj grupoj, kiuj perdis sian gepatran (romaan) lingvon, alvenis, malbone adaptiĝis kaj havis oftajn konfliktojn kun neromaoj, kiuj ne toleris “kulturon” de slovakaj romaaj setlejoj. Se alvenis romaaj viroj sole, ili gajnis monon, iun parton de la mono sendis hejmen, sed ankaŭ multe da mono elspezis por alkoholo, cigaredoj, riskemaj ludoj, ĉar en laboristaj kolektivoj ofte estis nur homoj kun malalta kultura nivelo.

(Proverbo: *Te gaĝo sikhlijlahas le Romestar leskero laĉho, Rom na sikhlijlahas gaĝestar leskero nalaĉho.* / Se neromao estus kompleza lerni de romao tion, kio en romao estas bona, romao ne lernus tiel kompleze de neromao tion, kio en neromao estas malbona.)

La tria ondo alvenis en la 70aj jaroj, kiam en Slovakio oni neniigis romaajn setlejojn. Slovakaj romaoj estis translokigitaj en blokajn domojn, perdis siajn tradiciojn, kulturojn kaj lingvon.

Socialismaj oficistoj neniam respektis romaajn kutimojn kaj tradiciojn. Romaoj estas dividitaj en multaj grupoj, kiuj havas diversajn kutimojn, kulturajn nivelojn kaj dialektojn. Sed oficistoj decidis, ke ĉiuj romaoj devas loĝi kune. Tial ekzemple romaoj de alta kategorio (*juĝe*-romaoj) havis kiel la plej proksimajn najbarojn romaojn de la plej malalta kategorio (*degeŝ*-romaojn), kun kiuj ili ne komunikas.

Socialisma reĝimo donis al romaoj loĝejojn (ofte prioritare), sed oficistoj ne sciis pensmanierojn de eksaj nomadoj. Ekzemple neromaoj ofte klopodas perturbigitajn aĵojn aŭ ripari aŭ riparigi – romaoj tion ne faras, ili difektitajn aĵojn forĵetas kaj volas novajn. Sincere dirite: ĉu tiu konduto ne similas al konduto de nuntempa konzuma socio?

Se romaoj ricevis novan loĝejon, ili ĝin rapide eluzis – kaj volis novan.

Romaoj ofte neglektas malordon ĉirkaŭ siaj domoj. Ili ŝatas loĝi en grandaj komunumoj, faras bruon. Tial neromaoj lokojn, kie loĝis romaoj, baldaŭ forlasis. En socialisma Ĉeĥoslovakio ekestis la unuaj romaaj getoj. Eĉ en la jaro 2023 en



Ĉeĥa Respubliko loĝas 80–100 miloj da romaoj, preskaŭ duono da romaoj, en getoj.

Socialisma reĝimo superestimis permanan laboron, kiun oni bone pagis. Sed post la jaro 1989 tio finiĝis kaj romaoj estis la unuaj, kiuj perdis laboron.

Kiam Ĉeĥoslovakio estis dividita inter Ĉeĥa kaj Slovaka Respublikoj (en 1993), slovakaj romaoj fariĝis eksterlandanoj kaj devis peti civitanecon de Ĉeĥa Respubliko.

En Ĉeĥio romaoj estas la plej multenombra malplimulto (ĉirkaŭ 250 000 personoj). Ĉirkaŭ la duono loĝas en getoj. Tri kvaronoj de romaoj apartenas al slovakaj romaoj, malpli ol unu kvarono estas hungaraj romaoj, ĉirkaŭ 30 000 estas olaĥaj romaoj (kiuj en la dua duono de la 19a jarcento alvenis el hungara Valaĥio) kaj kelkaj familioj apartenas al sintoj. Tiuj grupoj nek komunikas nek kunlaboras.

Memkonscio de romaoj ofte estas malalta. En la jaro 2011 dum censo nur 13 150 loĝantoj de Ĉeĥio konfesis romaan naciecon.

Ĉirkaŭ 47 % da romaoj en produktiva aĝo dependas nur de ŝtataj financaj kontribuoj. Ili scias ruze misuzi kontribuan sistemon. Ekzemple, se naskiĝis romaa infano, ĝia patrino diris, ke patro de infano estas avo de infano. Tio estas protokolita. Kial? La avo baldaŭ mortos kaj romaa infano havas duonorfan ŝtatan financon kontribuon.

Romaoj ofte estas ruzaj, sed ne estas spertaj en financaj aferoj, tial ili fariĝas predoj de uzuristoj kaj trompisto.

Oficistoj konsilis al gepatroj paroli

kun romaaĵ infanoj ĉeĥe. Sed la gepatroj parolis ĉeĥe tre malbone. Tial iliaj infanoj bone sciis nek romaan nek ĉeĥan lingvojn.

Al romaa lingvo ĝis nun mankas faka terminologio.

Infanĝardenoj ne ricevas ŝtatajn subvenciojn, tial romaaĵ infanoj ilin ne uzas. Aktivuloj nun batalas por donacioj al lastaj klasoj de la infanĝardenoj, por ke romaaĵ infanoj vizitu la infanĝardenojn antaŭ eniro en bazajn lernejojn.

Ĉirkaŭ 86 % da romaoj havas nur bazan aŭ nefinitan bazan klerigon. Ĉirkaŭ 30 % da romaoj estas analfabetaj (2009). En multenombraj romaaĵ familioj lernantoj ne havas trankvilan lokon por studado. Sed ankaŭ iliaj gepatroj kaj geavoj ne havas bonan rilaton al lerneja klerigo. Ili volas ke infanoj kaj nepoj baldaŭ ie eklaboru kaj ekgajnu salajron por romaa komunumo. Romaoj ofte pensas nur pri aktuala situacio kaj ne pri futuro.

Nur 12 % da romaoj havas metiistajn atestojn. En laborlokoj ili ofte ne restas longtempe.

Sanstato de romaoj estas pli malbona ol sanstato de neromaoj. Ĉirkaŭ 25 % da neromaoj ĝisvivas emeritan aĝon, ĉe romaoj nur 6 %. Romaoj estas sesfoje pli multe malsanaj ol neromaoj.

Dum socialismo kuracistoj romaaĵajn virinojn steriligis, por ke ili ne plu havu infanojn.

## Religio

En Ĉeĥa Respubliko pli ol 80 % da loĝantoj estas ateistoj. Kredantoj Inter Romaoj estas plimulte katolikoj. Romaoj ne uzadis

skribon, sed edukitaj romaoj skribas uzante ĉeĥan alfabeton. El Sankta Biblio voluntuloj romaigis Novan Testamenton. Romaoj, kiuj estas kredantoj, ofte miksas kristanisman kun siaj religiaj ideoj. Ili ofte estas superstiĉaj, kredas pri postmorta vivo, revenantoj kaj mulooj (fantomoj de mortintoj), kiuj povas fari domaĝojn al vivantaj homoj. Al romaaj kutimoj apartenas gardado apud mortinto antaŭ entombigado kaj dediĉo de transtombaj donacoj al mortintoj (viroj en ĉerkoj ofte ricevas botelojn da prunbrando sub siajn kapojn kaj monon en siajn poŝojn). Kaŭze de pompaj entombigoj romaoj povas ŝarĝi sin per ŝuldoj.

En la jaro 2011 apud Frýdlant (norda Bohemio) Moravia Kunfrataro, kiu ekde la jaro 2005 kunlaboras kun romaoj, fondis romaan kolegion *Nevo Ĝivipen* (Nova Vivo).

### Atakoj kontraŭ romaoj

En la 90aj jaroj romaoj suferis de provokoj de razkapuloj (novnazioj).

La 19an de aprilo 2009 en Vítkov kvar razkapuloj nokte atakis per molotov-boteloj domon, en kiu dormis romaa familio. Tri homoj estis vunditaj. Knabino Natalia (eĉ ne du-jara) estis vundita sur 80 % da korpa surfaco kaj perdis tri fingrojn. Ŝi estis multfoje operaciita.

En la jaro 2023 aperis konfliktoj inter romaoj kaj ukrainaj rifuĝintoj. La 10an de junio 2023 en Brno en tramo veturis grupo de junaj romaoj. Laŭ rakonto de unu atestanto romaoj faris bruon, molestis kunvojaĝantojn per laŭta muziko el iu radio, poste ili eĉ en la tramo ekfumis. Tio ne plaĉis al 37jara ukraino, kiu la romaojn admonis. Romaoj ne bone komprenis ukrainan lingvon, sed konflikto komenciĝis. En celo de vojaĝo romaaj viroj diris al virinoj, por ke ili iru antaŭen. Tri romaoj ekbatis unu ukrainon kaj faligis lin sur teron. En tiu situacio la ukraino uzis tranĉilon. Rezulto: unu morta 22jara romao, alia romao estis vundita, ukraino estas en malliberejo. Protestoj, manifestacioj kaj manbatoj inter romaoj kaj ukrainoj sekvis. Krom tio romaoj ne ŝatas ukrainojn, ĉar konsideras ilin konkurantoj. Ukrainoj povas esti universitatanoj, sed se ili ne scias ĉeĥan lingvon, ili laboras nur permane, same kiel multaj romaoj. Antaŭ milito en Ukrainio ŝtato helpis precipe al romaoj, nun ĝi helpas ankaŭ al ukrainoj.

### Helpo al romaoj

Fama romaa aktivulo David Tišer dum la Unua Romaa Konferenco, kiu la 26an de majo 2023 okazis en Brno, diris, ke romaoj bezonas fortan mezan klason kaj edukitajn spertulojn.

Nombroj en Esperanto kaj en Romani.

El faldfolio "Romani | Language", (<https://rm.coe.int/roma-history-factsheets-eng/1680a2f2f8>)

Esp-o	unu	du	tri	kvar	kvin	ses	sep	ok	naŭ	dek	dudek	tridek	kvardek	cent
<i>Romani</i>	<i>jekh</i>	<i>duj</i>	<i>trin</i>	<i>ŝtar</i>	<i>pandž</i>	<i>šov</i>	<i>efta</i>	<i>oxto</i>	<i>enja</i>	<i>deš</i>	<i>biš</i>	<i>tr(ij)anda</i>	<i>saranda</i>	<i>šel</i>

Ekde la jaro 2001 al romaoj helpas programo Homoj en Nia Socio (Ĉeĥa Respubliko, Bulgario, Rumanio, Slovakio).

En bohemia urbo Kolín funkcias Romaa Sociala Mezlernejo (*Romská střední škola sociální*). En lokaj urbo-domoj laboras ĉirkaŭ 50 socialaj asistantoj. En regionoj helpas ĉirkaŭ 80 romaaj konsilantoj. En lernejoj helpas pedagogaj konsilantoj (pli ol 300). Cento da memvolaj helpantoj laboras inter romaoj en stratoj. Dudek policanoj estas romaoj.

En Ĉeĥio funkcias 200 neregistaraj senprofitaj organizoj.

### Eduka programo Gendalos

La programon fondis kompanio IQ Roma servis, kiu ekde la jaro 1997 kunlaboras kun romaaj studentoj, iliaj gepatroj kaj instruistoj. Ĉiujare ĝi helpas al ĉirkaŭ 70 infanoj. Ĝi kontaktas lernantojn de la 8a kaj la 9a klasoj de baza lernejo. Ĝi al studentoj ofertas stipendion, por ke la infanoj ekstudu en mezlernejo kaj sukcese finu studadon.

Kaj kion partoprenantoj de Gendalos (Spegulo) planas?

- Futuro dependas de ekologio. Mi volas posedi propran firmaon por

muntado de sunaj paneloj. (Richard, 18 jaroj, 3 jaroj en Gendalos.)

- Mi volas posedi vendejeton por vendado de optikaĵoj. Unue en Bohemio, poste eksterlande. (Daniela, 17 jaroj, 3 jaroj en Gendalos.)
- Helpe de Gendalos mi preparas min por eniraj ekzamenoj, sed unufoje mi kun ili ankaŭ tendumis (Adam, 14 jaroj, 3 jaroj en Gendalos.)
- Se mi komencos ion ajn fari, mi kutimas tion fini. (Daniela, 25 jaroj, 9 jaroj en Gendalos.)

Ekde la jaro 1991 en Brno funkcias Muzeo de Romaa Kulturo (*Muzeum romské kultury*)<sup>1</sup>.

Ekde la jaro 2023 en Prago oni povas viziti Centron de Romaoj kaj Sintoj (*Centrum Romů a Sintů*)<sup>2</sup>.

Antaŭ romaoj ankoraŭ estas dornoplena vojo, sed ili havas ŝancon trovi sian lokon inter evoluitaj nacioj de tuta mondo.

1. <https://www.rommuz.cz/en/>. La muzeon eblas vidi sidante hejme. Angla aŭ ĉeĥa teksto.
2. <https://www.rommuz.cz/en/praha/>



El la surreta muzeo



# Dek helpoj — pri la Dekalogo

Oka ordono — Ne ŝtelu (Eliro 20,15)

József FARKAS, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Sed la Izraelidoj pekis kontraŭ la anatemo; Aĥan, filo de Karmi, filo de Zabdi, filo de Zeraĥ, el la tribo de Jehuda, prenis el la anatemitajo, kaj la kolero de la Eternulo ekflamis kontraŭ la Izraelidoj. .... Tiam Josuo disŝiris siajn vestojn, kaj ĵetis sin vizaĝaltere antaŭ la keston de la Eternulo, restante tiel ĝis la vespero, li kaj la plejaĝuloj de Izrael; kaj ili ŝutis polvon sur siajn kapojn. ... Tiam la Eternulo diris al Josuo: Leviĝu! por kio vi ĵetis vin vizaĝaltere? Izrael pekis, kaj ili agis kontraŭ Mia interligo, kiun Mi donis al ili, kaj ili prenis el la anatemitajo, kaj ŝtelis, kaj mensoge neis, kaj metis inter siajn vazojn. Tial la Izraelidoj ne povos rezisti antaŭ siaj malamikoj, sian dorson ili turnos al siaj malamikoj, ĉar ili falis sub anatemon; Mi ne estos plu kun vi, se vi ne malaperigos la anatemitajon el inter vi.

Josuo, ĉapitro 7, 1–12a (partoj)

**C**erte estas, kiu esperas, ke nun mi minacos la ŝtelistojn. En la sesa ordono ni jam parolis pri la murdistoj, en la sepa ordono pri la adultuloj, do nun ricevos la punon la ŝtelistoj.

Mi ne kovras mian celon, ke mi ŝatus se vi akceptus novajn pensojn pri tio, kio estas ŝtelado, kiu estas ŝtelisto. Due mi ŝatus, ke en la spegulo de tiuj novaj pensoj vi ekzamenus vin mem, kaj mi ŝatus, se per la rezulto de tiu ĉi mem-observado komenciĝus nova agado en via vivo.

En la lumo de la plena mesaĝo estas tie ĉi pli, ol kiun ni skribis en nia infanaĝo sur nian liniilon: “Ĉion vidas la okulo de Dio, ne ŝtelu mian liniilon”. Estas pli, ol ke mi vere tuŝis la aĵon de aliulo kaj forprenis ĝin.

Per kelkaj ekzemploj mi ŝatus klarigi, kion tio signifas. Iu havas multe da libera tempo kaj senfine parolas al alia homo, ŝtelas la tempon de la alia homo, kiu havus tre gravan laboron. Antaŭ Dio ankaŭ tio estas ŝtelado, ŝtelado de tempo de valora homo. Aŭ: kiel volonte homoj klaĉadas, sen kontrolo diras malbonaĵojn pri alia homo. Ili ŝtelas la honeston de la alia homo. Antaŭ Dio ankaŭ tio estas ŝtelado!

Kio estas la esenco de la ŝtelado? Simple dirite: Mi volas pli! Mi havas ion, sed estas malmulte, nesufiĉe, mi bezonas pli, kaj se la alia ne donas, mi prenas, ŝtelas de li. En la profundeco de la ŝtelado estas viv-soifo: mi volas vivi pli plenan vivon. Al mia vivo mi ankoraŭ bezonas tion kaj tion, kaj se ne eblas alimaniere ricevi, tiam mi prenas, ŝtelas. Mi volas

vivi pli riĉan vivon, al tiu mi bezonas kio estas ĉe vi, kaj mi prenas tion, kaj tio povas esti via tempo, via honoro aŭ via havaĵo.

Multaj kredantaj homoj diras en la nomo de Dio, ke la solvo de tiu ĉi problemo, la ordono de Dio estas la modesteco, la malriĉeco, la rezigneco. Do kiam vi sentas la emon, ke vi bezonas ankoraŭ ion al via plena, riĉa vivo, tiam vi hontu, tiam tiun senton, tiun deziron vi nomu kulpo kaj ekstermu, fortranĉu tiun senton el vi mem, kaj tiam vi ne ŝtelos.

Estas logika penso, kaj certe estas iom da vereco en ĝi. Sed mi tiel esprimas la penson de Dio: ‘Homo, vi pravas, kiam vi volas pli riĉan vivon. Ankaŭ mi volas, ke vi havu riĉan vivon. Vi pravas, kiam vi volas pli, sed tion vi ne ŝtelu, ne rabu de alia homo, vi mem laboru por tio.’

La penso de Dio estas la riĉiĝo, la pleniĝo de la homa vivo per laboro, kaj ne per ŝtelado.

Ne estas la vero, ke la penso de Dio estas la rezigno, la malriĉeco, la nenio. Sed la vojo al la plena vivo ne estas tia, ke viajn havaĵojn vi ŝtelu, rabu, sed tia estas la vojo, ke per honesta, diligenta laboro vi havu viajn havaĵojn. Tiu ĉi penso deformiĝis en la homa animo tiel, ke restis la deziro vivi pli riĉan vivon, sed la homo pensas, ke tion eblas atingi per pli mallonga vojo, nur devas forpreni de la alia homo, kion oni volas kaj deziras. La mesaĝo de Dio estas, ke tiel fariĝas la vera, plena homa vivo, se per sia laboro li riĉiĝas. Estas sakvojo, misvojo, se la homo volas riĉiĝi per rabado, ŝtelado.

Vere estas malgajige, kiel homo stumbladas inter diversaj eraraj pensoj. Du erarajn pensojn mi montras nun en la perspektivo de jarcentoj.

La unua penso floriĝis antaŭ jarcentoj en la tielnomata kristana Eŭropo, kaj tion ŝanĝis alia penso, kiu same ne gvidas al plena homa vivo. La mezepoka kristana penso estis la idealo de malriĉeco. Tion ŝanĝis la idealo de la riĉeco. Kiel en la mezepoko la idealo estis la malriĉeco, ĵus tiel la nuntempa idealo estas la riĉeco. Tiu penso estas ankaŭ en niaj infanoj, kvankam neniu instruas tion al ili, ili transprenas tiun penson, kiu ĉirkaŭas nin, estas en la aero.

Same estis en la aero la idealo de la malriĉeco. Pri la savado la penso de Dio estas la malriĉeco. Kiu akceptas la penson de Dio, la memvolan malriĉecon, tiun per savado premias Dio.

Ni devas honeste diri, ke tiu ĉi penso estis malutila al la tuta homaro. Kiam la idealo estas la malriĉeco, la malordo, la malpureco, el tiuj ne devenas nek higieno, nek medicino.

Tion ŝanĝis nun la idealo de la riĉeco, kiu nepre kuniĝas kun nehumaneco. Kiel la malriĉeco kuniĝis kun Dio, sed erare kuniĝis, nun la riĉeco kuniĝas kun homo, sed erare kuniĝas. Ĉar la idealo de riĉeco praktike signifas senkompaton, liberiĝon de instinktoj de sovaĝaj bestoj. Ne estas problemo, se mi piedpremas, rabas iun, la esenco estas, ke mi atingu mian celon, la riĉecon.

Valorus pensadi pri tio, ke la nuna mondo, per sia plur-miliardoj da homoj, kiom da fortostreĉoj dediĉas por produkti varojn, kaj kiom da fortostreĉoj dediĉas

rabi! Ĉar rabado estas la armado, la industria spionado, la teknika preparado, ke unu lando rabu la alian landon. Maltrankvilige granda procento iras al tiu ĉi rabada instinkto. Vere komplika demando estas. Sociologoj kaj filozofoj realizis, ke la rapida evoluo de la homaro, la malsimpliĝo de la produktado postulas ion: tion, ke oni havu sub komunuma kontrolo tion, kion eble antaŭe iu sole posedis. Tiun komunuman kontrolon eĉ per la plej rigoroza kristana pensmaniero neniu povas juĝi kiel rabado.

Luther donis tre bonan difinon pri la esenco de la ŝtelado: “Ŝtelado estas, kiam mi tiel havas avantaĵon, ke iu alia havas malavantaĵon”. Mi gajnas, la alia homo malgajnas. Ni povas imagi tion, ke iu ĝuas tian grandan parton de la sociaj valorajoj, ke tiel la aliaj homoj jam ricevas malpli. En multaj aspektoj estas frapa tiu ĉi difino: pri lando, pri fabriko, pri familio kaj eĉ pri kristana komunumo, kiam iu rapide, malmultekoste volas ricevi avantaĵon tiel, ke ŝtelas de iu alia.

Nun jam ni bone vidas, ke ne nur tio estas ŝtelado, kiam mi efektive prenas la aĵon de la alia homo. Ankaŭ tio estas ŝtelado, kiam Dio donis ion al mi, Li donis pli multe ol mi bezonas, kaj tiun pluson mi ne donas al la alia homo. Tiu pluso kvankam estas ĉe mi, ne estas mia. Estas ŝtelado, se mi ne donas tion al alia homo. Kaj tie ĉi nia pensado fariĝas biblia pensado. Biblio parolas pri administrantoj. Dio donis al mi ion, kaj pro tio donis, ke mi transdonu, disdonu al aliaj homoj. Dio donis al mi pli, ol mi bezonas. Se tion “pli” mi uzas al mi mem, ke mi

mem vivu pli riĉan vivon – laŭ la juĝo de Dio mi estas ŝtelisto.

Kiel Jakobo skribas en sia letero (4, 17): “Kiu povus fari bonon kaj ne faras, tiu estas pekulo.”

Ĉiuj, kiuj havas ion, per kiu li povus fari ian bonan agon, sed ne faras tion – fariĝas ŝtelisto.

Tiuj riĉaj popoloj (aŭ nacioj), kiuj per atombomboj ĉirkaŭas kaj tiel defendas sian riĉecon, kiam centmilionoj malsatas – tiuj estas ŝtelistaj popoloj. Ĉiu, kiu defendas sian riĉan vivon kontraŭ malriĉuloj, estas ŝtelisto. Dio donis al li iun pluson, kiu ne estas lia, li devas disdoni tion. Tiu kredanta homo, al kiu Dio donis animajn travivaĵojn, konsolon, resaniĝon, kiu ricevis ion de Dio, sed malkuraĝas konfesi tion al alia homo, ankaŭ tiu estas ŝtelisto. Tiu ŝtelas de la alia homo la eblecon de la konsolo kaj resaniĝo. La malkuraĝa kredanta homo same estas ŝtelisto kiel la riĉaj popoloj. Se la kredanta homo ĝuas sian savadon, kaj akceptas, ke homoj ĉirkaŭ li/ŝi vivas en malbeno, nur pro tio, ĉar la kredanta homo malkuraĝas paroli pri tio, ke ekzistas resaniĝo, ekzistas savado – li estas ŝtelisto.

Mi ŝatus profundigi tiun scion tiel, ke mi kunportas ĝin pli proksimen al ni. Kaj mi ŝatus, se je la fino ni ĉiuj klinus nian kapon kaj preĝus tiele: Dio, estu mizerikorda al ni, al via ŝtelista popolo, kiu prenas Vian donacon kaj egoiste vivas nur al si mem.

Tri nivelojn havas la kulpo de la ŝtelado, kiun kredanta homo povas fari (la nekredantoj povas fari nur la simplan gradon).

La unua grado estas, kiam la kredanta homo reen-ŝtelas sin mem de Dio.

En la Unua letero al la Korintanoj, en la 6a ĉapitro estas tiu ĉi du versikloj (19-20): “Aŭ ĉu vi ne scias, ke via korpo estas templo de la Sankta Spirito, kiu enloĝas vin, kaj kiun vi ricevis de Dio? Vi ne estas de vi mem! Vi estas kare aĉetitaj: honoru do Dion en via korpo.”

Ni ne estas de ni mem, ĉar Dio aĉetis nin, eĉ! Li kare aĉetis nin! Ni estas Liaj posedaĵoj. La unua grado de la ŝtelado de kredanta homo, kiam li reen-ŝtelas sin mem de Dio, kiel li estus de si mem kaj tiel disponas pri sia mono, tempo, kredo kaj scio.

Ni aparte devus paroli pri tio, ke – bedaŭrinde – kiel bone ni kapablas ĉion klarigi. La plej granda bravuro de la homa spirita evoluo, ke ĉion ni povas klarigi, argumenti, raciigi. Nia intelekto estas tiel lerta kaj ruza ilo, ke ĝi ĉion povas klarigi. Ankaŭ tion, ke ni tiel administras nin mem, kvazaŭ Dio havus neniun kontakton kun ni.

Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la morta danĝero, el la nerva kolapso, el la ekonomia bankroto kaj nun Mi diras al vi: Ne ŝtelu! Mi aĉetis vin al Mi mem, vi ne reen-ŝtelu vin mem de Mi!

La dua kulpo de la kredantaj homoj estas la kulpo de Aĥan, kiel ni legas ĉe Josuo en la 7a ĉapitro: Aĥan prenis el la anatemitaĵo, do el Dio. Kiu re-ŝtelas sin mem de Dio, tiu kompreneble ankaŭ ŝtelas la aĵon de Dio.

La unua ŝtelado estas, ke ni reen-ŝtelas nian tutan vivon, kaj la dua ŝtelado estas, ke kion Dio metis, lasis al alia homo, tiun

ni mem uzas. Kiam la aĵojn, kiuj estis dediĉitaj al Dio, ni retenas. Pro tio estas malgajno kaj malbeno sur nia vivo, kiel Dio diris al Josuo: “Leviĝu! por kio vi ĵetis vin vizaĝaltere? Izrael pekis, kaj ili agis kontraŭ Mia interligo, kiun Mi donis al ili, kaj ili prenis el la anatemitaĵo, kaj ŝtelis, kaj mensoge neis, kaj metis inter siajn vazojn. Tial la Izraelidoj ne povos rezisti antaŭ siaj malamikoj, sian dorson ili turnos al siaj malamikoj, ĉar ili falis sub anatemon...”

La tria kulpo estas la sekvo de la aliaj du: la koro de la kredanta homo malmoliĝas – kaj ŝtelas el la ŝtato, el la socio, el la alia homo – ĉar tiam jam nenio gravas, ĉar la koro jam estas malmola, ĉar tia vivo jam estas diabla vivo.

Dio kompatu nin, ke tiu ĉi mesaĝo atingu nian koron. Ke ni komprenu, kio estas la diferenco inter la dia kaj la diabla vivo.

La mondo vivas tiun diablan vivon, preni, eĉ predi ĉion, kion mi iel povas preni, riĉiĝi – tio sinteno plenigas la mondon kaj gvidas la mondon al katastrofo.

La esenco de la dia vivo troviĝas en la letero al la Filipianoj, en la dua ĉapitro, tiel: “Tiu sama spirito estu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo, kiu kvankam estis en la formo de Dio, li ne pensis pri sia riĉa vivo kiel perdo, sed sin malplenigis”

Malplenigis sin – tio signifas, ke Kristo Jesuo disdonis ĉion, kion li ricevis de Dio.

Nia Ĉiela Patro donu al ni forton, ke ni povu tiel pensadi, vivi kaj agi.



# Kontrasto de stereotipoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ Islamo aŭ aliaj religioj

Prelego dum la kristana kongreso en Bjalistoko 2023

Viviana ISERNIA, IT

**E**n la artikolo 18 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj ni legas: *Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; ĉi tiu rajto inkluzivas liberon ŝanĝi sian religion aŭ kredon kaj manifesti, sole aŭ en komunumo, publike kaj private, sian religion aŭ kredojn, en instruado, en praktikoj, en kultado kaj en la observado de ritoj.*

Alia artikolo deklamas la saman temon: tio estas la Artikolo 12 de la Islama Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Tamen ekde antikvaj tempoj, individuoj aŭ grupoj de homoj suferas ĉie diskriminacion pro sia religio. Ekzemple, homoj kiuj konfesas Islamon. Religia maltoleremo povas havi diversajn nuancojn kaj povas okazi ankaŭ inter tiuj, kiuj konfesas la saman religion: ni vidos la kazon de Saud-Arabio, kie la reĝa familio, sunaaj islamanoj, diskriminacias kontraŭ ŝijajismaj islamanoj, adoptante ekstremajn rimedojn kiel mortpuno.

Islamismo estas monoteisma religio, kiu ampleksas almenaŭ kvardek naŭ landojn en la mondo, sed ĝi estas ankaŭ religio kun mil vizaĝoj kaj necesas havi kompletan bildon de la grandega islama komunumo por ne renkonti terminologiajn kaj konceptajn erarojn kaj sekve, ne gvidi en diskriminaciajn agojn kontraŭ viroj kaj virinoj, kiuj simple kredas je doktrino malsama ol la nia.

Mia ĉeesto ĉi tie, en la Islama Centro de Kruszyniany, okazis hazarde ĉar kaptis mian atenton la malĝusta terminologio ofte uzata pri Islamo, sur la afiŝo de ĉi tiu Kongreso. La frazo de Zamenhof “*Kristanoj, hebreoj au Mahometanoj...*” nuntempe povus ŝajni ofendo al pli kredantaj islamanoj, sen historia klarigo de la citaĵo, ĉar tiuj, kiuj konfesas Islamon, ne kredas je Mohamedo sed kredas je Dio. Mohamedo estas nur la Profeto. En la araba lingvo, islām signifas “vole submetiĝi al Dio”, do kiam oni aludas al homoj kiuj kredas je Islamo, oni devas uzi la esprimon “islamanoj” kaj neniam “mahometanoj”. Anstataŭe, la adjektivo “islama” estas uzata por priskribi historion, arton, religion kaj koranajn preskribojn.

Do, por priskribi homojn ni uzas “islamanoj” kaj por priskribi aferojn oni uzas “islama”.

Kiam oni ne konas (aŭ ne volas scii) alian religion aŭ alian kulturon, oni komencas pensi en stereotipoj kaj antaŭjuĝoj.

En Italio kelkaj antikvaj idiomaĵoj devenas de stereotipoj – ekzemple “la Svisoj estas precizaj” – sed la grava afero estas, ke tiuj ne konduku al malbone trakti homojn nur ĉar ili estas malsamaj ol ni.



Inter la plej oftaj stereotipoj al islamanoj estas “ĉiuj ili estas teroristoj”.

Kiam oni pensas malbone pri homo, la instinkta ago estas malproksimiĝi de li aŭ agi perforte kontraŭ li.

Mi estas aktivistino de Homaj Rajtoj en Italio kaj mi kutime proponas rol-ludojn aŭ partoprenajn agadojn en lernejoj, studentoj kaj instruistoj, por trakti la temon de Islamo kaj klopodi kontraŭbatali islamofobion aŭ ajnan fobion ligitan al religio ĝenerale.

Unu tia agado nomiĝas “identecmolekulo”<sup>1</sup>. La celoj estas enkonduki la konceptojn de stereotipado, antaŭjuĝo kaj diskriminacio kontraŭ islamanoj.

En la grupo mi jene laboras:

### 1 - Persona molekulo

Mi disdonas paperpecon kaj skribilon al ĉiu partoprenanto, petante ilin desegni sian propran identecmolekulon: rondo en la centro kaj kvin aliaj rondoj ĉirkaŭ ĝi. En la centra rondo, oni enigu sian nomon kaj en la aliaj rondoj enigu aspektojn de sia identeco.

### 2 - Stereotipoj kaj antaŭjuĝoj

Post kiam ili priskribis sian propran molekulon, sur specimena bazo, almenaŭ duono de la partoprenantoj rakontu pri siaj molekuloj.

Mi skribas la komunajn detalojn sur la tabulo. Fokusas sur unu aŭ du ĝeneralaj (ekz. italoj, studentoj) kaj listigas la stereotipojn, kiuj estas ofte asociitaj kun ĉi tiu grupo de homoj (ekz. Italoj = mamono, mafio, spageto, kortuŝa), emfazante la negativajn aspektojn.



Viviana Isernia, en Bjalistoko 2023

Ni kune diskutas la koncepton de stereotipo kaj antaŭjuĝo.


Mi komence priskribas la molekulon komencante de la nomo kaj ke la kvin rondoj reprezentas la kvin aspektojn kun kiuj oni prezentas sin ekstere.

### 3 – Kiu estas islamano?

Partoprenantoj montras per sia mano respondon al la jenaj demandoj:

- 1) Kiom el vi konas islamanojn?
- 2) Kiom el vi havas antaŭjuĝojn kontraŭ islamano?
- 3) Kiom el vi opinias, ke vi havas antaŭjuĝon kontraŭ islamano?

Poste mi petas la partoprenantojn turni la folion de sia propra molekulo kaj desegni la “molekulon de iu islamano”.



Ekzemplo de Identec-Molekulo:

En la centra rondo, ili indiku la antaŭnomon de iu (ebla) islamano.

Mi ne donas aludojn, nur emfazas, ke tiu devas esti islamano (mi ne sugestas pri viro aŭ virino).

Post ĉirkaŭ 10 minutoj, mi invitas iujn partoprenantojn (minimume 5), rakonti pri siaj molekuloj pri islama persono komencante pri la nomo.

Ĉe la fino de la molekuloj, substreku ĉiujn rezultajn stereotipojn/antaŭjuĝojn kontraŭ islamano, donante la klarigon ĉe la fino.

La sekvaj antaŭjuĝoj povas rezulti:

- molekulo de viro (komento: islamano povas esti viro, virino, knabo, knabino, LGBTI homoj);
- antaŭnomo aŭ nacieco de araba deveno (komento: araboj ankaŭ povas esti kristanoj, judoj, koptoj, ateistoj. Araboj ne estas ĉiuj islamanoj kaj islamanoj ne estas ĉiuj araboj);
- poligamio (komento: ne ĉiuj islamanoj estas poligamiaj, en kelkaj ŝtatoj kun islama plimulto ĝi estas nuligita, ekzemple en Tunizio; ĝi estas indikita en la Korano sed ne rekomendita);
- negativaj adjektivoj ekz. teroristo (komento: oni pensas, ke ilia religio antaŭenigas perforton kontraŭ aliaj religioj);
- la frazo “Allah Akbar” (komento: Dio estas granda) estas dirita de araboj de ĉiuj religioj kaj ne estas frazo de teroristoj;
- manko de terminoj rilataj al laboro, kulturo (komento: islamanoj estas konsiderataj tute “aliaj”: kvazaŭ ili havas malmultajn interesojn, be-

zonojn aŭ valorojn komunaj (se ekzistas!) kun homoj ne islamanoj);

- por ina molekulo: nikabo, burko, submetiĝema, senrajta (komento: aspektoj ne diktitaj de religio sed de lokaj kutimoj. La vualo uzata estas la hijābo. Komparu kun aliaj mono-teismaj religioj, eĉ en la preĝejo kaj en la sinagogo, vestaĵojn kiuj respektas la diecon. Distingo inter majoritataj islamanoj kaj minimuma procento de fundamentistoj);
- la *burko* estas la plena blua vualo kun reto sur la okuloj, tipa de Afghanio;
- la Korano deklaras ke viroj ankaŭ havas restriktajn sur vestaĵo kiam en la ĉeesto de Dio;
- maltoleremo al aliaj religioj (komento: judoj kaj kristanoj estas difinitaj kiel “Homoj de la Libro” kaj do respektataj de islamanoj).

Fine, ĉiam estas interese koni la trajtojn de alia popolo, de alia kulturo aŭ religio. Kune ni povas kontraŭstari stereotipojn kaj tiel malhelpi agojn de perforto kaj diskriminacio kontraŭ ĉi tiuj homoj.

Do gravas krei spacojn por dialogo pri la fenomeno de religia maltoleremo kaj konstrui kulturon bazitan sur homaj rajtoj kaj respekto.

Referenca noto -----:

1. Isernia Viviana, (2020), *Allah Akbar. Manuale di Educazione ai diritti umani contro l'islamofobia* [eo: Allah Akbar. Manlibro pri edukado pri homaj rajtoj kontraŭ islamofobio], Efestio Editions, (itala). ☞



# La kastelo en Visegrád

El Vikipedio

Redaktis Ráczkevy-Eötvös Ágnes, HU

**D**um nia ĉijara kongreso ni per ŝipo vojaĝos norden sur la Danubo ĝis Visegrád (višegrad), kie ni vizitos reĝan kastelon.

La kastelo de Visegrád estas fortikaĵo en la Danuba Kurbo, en la urbo Visegrád. Ĝi etendiĝas de la alta rokpinto de la Montoj Visegrád ĝis la bordoj de Danubo. En la mezepoko ĝi havis gravan reprezentan rolon, ĉar ĉi tie troviĝis unu el la plej riĉaj palacoj de la hungaraj reĝoj, kaj ankaŭ ĝia politika kaj milita graveco estis ne neglektinda. Ĉi-lasta konservis sian rolon ĝis la fino de la 17-a jarcento. Ĝi konsistas el du partoj: la pli malalta kastelo kaj la citadelo.

En la daŭro de la historio, la popoloj ĉi tie loĝantaj konstruis plurajn fortikaĵojn por konservi la vojon tra la gorĝo sub sia kontrolo. Timante alian danĝeron, Béla IV konstruis la sesangulan, dikmuran loĝturon, kiun popoltradicio poste nomis la Turo de Salomono.



La turo de Salomon

Dum la reganto konstruis sur la bordoj de Danubo, lia edzino, reĝino Mária, plifortigis la altan rokpinton per la mono ricevita de la prezo de ŝiaj venditaj juvelaĵoj. La du partoj de la kastelo estis kompletigitaj per la ferma muro kuranta laŭ la kruta montoflanko, kies fino etendiĝis la tutan vojon al kastelo ĉe la Danubo. Dum la periodo de la interna milito komence de la 14a jarcento, ĝi estis

La citadelo de Visegrád



okupita de la armtrupoj de Máté Csák, kaj reĝo Károly Anjou, kiu unuigis la landon, prenis ĝin reen de ili kun sieĝo.

En la sekva periodo, la reganto konstruis la palacon apud la Danuba rivero, kiu havigis pli komfortan loĝejon, do nur la garnizono estis postenigita en la malgaja ŝtona kastelo. Dum la regado de Sigismondo de Luksemburgo, la krono estis konservita en la kvinangula malnova turo en la supra kastelo, sed en 1440 la korteganino Ilona Kottaner sukcesis ŝteli ĝin laŭ instrukcioj de reĝino Elizabeto la vidvino.

Baldaŭ post la kapto de Buda en la 16a jarcento, la turkaj armeoj preteriris ankaŭ Visegrád, ĝia unua sieĝo okazis en 1544, kiam la Salomona turo estis grave difektita. En la sekva jarcento kaj duono, la ĉiam pli kaduka konstruaĵkomplekso ŝanĝis posedantojn plurajn fojojn. Ĝi suferspertis sian finan detruon en la sieĝo kontraŭ la turkoj en 1685, sed la malamikaj trupoj baldaŭ retiriĝis de ĝi por protekti la multe pli gravan armean gravecon de kastelo en Buda.

En la sekvaj jarcentoj, pro la fortoj de la naturo kaj la disvastigo de la ŝtonoj, ankaŭ la ceteraj ruinoj rapide pereis. La ceteraj ruinoj de la antaŭa reĝa palaco estis disfaligitaj en la 18a jarcento, kaj poste ĝia loko estis forgesita. Kvankam elfosadoj estis faritaj pli frue, nur en la 1960aj jaroj komenciĝis la moderna monumentprotektado de la kastelo de Visegrád, kiu funkciis kiel grava sceno de la hungara historio, kaj kies laboro daŭre estos tasko por multaj generacioj.



La reĝa palaco  
Mediatius, CC BY-SA 3.0 /creativecommons.org

Komencante en 2017, la kastelo estis renovigita kiel parto de la Nacia Kastelo-Programo.

Pluraj ekspozicioj estas viziteblaj en la citadelo. Vi povas vidi ekspozicion prezentantan la historion de la kastelo, la fortikaĵsistemon rekonstruitan laŭ modelo, kopion de la hungara reĝa krono kaj la historion de ĝia konservado ĉi tie, panoptikon, kaj ĉasadan/fiŝkaptan/terkulturan ekspozicion.

Teksto el Vikipedio,

Fotoj, se ne alie indikite, kun afabla permeso el la retpaĝo [visitvisegrad.hu](http://visitvisegrad.hu).



# La rolo de manĝaĵo en niaj vivoj

El sveda artikolo pri vivmanieroj

Tradukis Bengt Olof Åradsson, SE

**M**anĝaĵo elvokas memorojn, donas al ni malstreĉiĝon, konstruas rilatojn. Ĝi markas apartenon kaj poziciojn, diras al ni ion pri kiu ni estas, de kie ni venas, kiel ni volas ke la socio estu.

Foje manĝaĵo ankaŭ estas rigardata kiel simbolo de nia kontrolo super nia korpo. De antikvaj tempoj, homoj kun fastado aŭ aliaj manĝritoj provis praktiki spiritan disciplinon. Multaj esploristoj parolas pri tio kiel la korpo nun, eĉ pli grande ol antaŭe, fariĝis 'projekto', kiun ni povas konstante plibonigi kaj disvolvi. Korpa fiksado foje prezentiĝas kvazaŭ io supraĵa, sed ĝi ankaŭ povas esti rigardata kiel esprimo de pli profunda bezono klopodi formi sian ekziston, regi sian vivon. Manĝaĵo povas fariĝi ankoraŭ alia maniero por marki sian unikecon. Samtempe, ĉiu unuopa sanprojekto povas konduki al la situacio ke la manĝaĵo perdas sian antikvan rolon en kreado de komunumo ĉirkaŭ la fajro aŭ la vespermanĝo, kie ni dividas la saman kaptiĝon, la saman rikolton, la saman panon.

De antaŭ longe ekzistas kredoj kaj reguloj pri tio, kiu manĝaĵo estas bona kaj malbona, kio estas ĝusta kaj malĝusta, eĉ tabua, por manĝi. Kio estas nova en nia tempo, estas la forta emfazo de la riskoj, de manĝaĵo kiel io danĝera. Manĝaĵo donas vivon kaj kontenton, sed ĝi ankaŭ povas konduki al nia morto,

kaŭzi kanceron kaj aliajn malsanojn, krei kaj substreki etikajn dilemojn, influi la klimaton. Tio, kio estas konsiderata bona kaj malbona manĝaĵo, ne plu estas gvidata laŭ tradicio kaj havebleco, sed pro sanaj konsiloj kaj rapide ŝanĝiĝantaj sociaj idealoj, kie unuflanke oni atendas, ke ni zorgu pri niaj korpoj, kaj aliflanke oni kuraĝigas nin ĝui la vivon kaj havigi al ni la bonon.

Krome, ni havas pli da ŝanco ol iam ajn elekti kian manĝaĵon ni deziras manĝi, sed samtempe scias tre malmulte pri ĝia origino, se en tiuj kazoj ni ne kreskas aŭ ĉasas. Ne estas mirinde, ke homoj fariĝas nesekuraj. Se tio ne sufiĉus, la nocioj pri la povo kontroli la korpon ofte estas en konflikto kun niaj biologiaj malsato kaj rekompencaj sistemoj.

Ĉio ĉi povas krei fiksiĝon sur manĝaĵo kaj sur la korpo, kiu foje povas riski kaj kaŭzi angoron kaj manĝajn malordojn kiel sekvo. Iuj provas diversajn dietojn, kun striktaj kadroj, kiuj kreas senton de identeco kaj parte klarigas kial interretaj diskutoj pri ekz. saturitaj kaj nesaturitaj grasoj povas vekti surprize fortajn emociojn. Aliaj ignoras ĉion, kio ankaŭ estas ebla sinteno. Ni simple ne povas liberiĝi de la graveco de manĝaĵo per kiu ni estas.

Por alporti klarecon kaj atingi almenaŭ ŝajnan certecon, ke la propraj elektoj estas la ĝustaj, multaj homoj apogas sin sur scienco kaj provas fortigi

siajn sociajn kaj personajn kredojn per objektivaj faktoj. Ĉi tio kondukas al esplorrezultoj foje distorditaj. La esploro pri nutrado kaj sano estas tiom ampleksa, ke preskaŭ ĉiam eblas trovi studon, kiu subtenas certan tezon. Tiamaniere la scienco povas, sufiĉe paradokse, kontribui al eĉ pli granda necerteco.

Por akiri plian klarecon pri tio, kion signifas manĝi sane, ni eble bezonos levi nian rigardon kaj vidi la gravecon de manĝaĵo en niaj vivoj pli ĝenerale, lasi la fiksadon pri la kvanto de graso kaj karbonhidratoj, la fokuson sur pezo kaj kalorioj, kiuj en multaj kazoj estas tute sensencaj. Ekzemple, nuksoj povas esti same altaj en kalorioj kiel nealkoholaj trinkaĵoj, sed estas ankoraŭ klare, ke nuksoj estas pli bonaj por niaj korpoj. Krome, studoj montras, ke modere tropezaj homoj, kiuj multe ekzercas, ricevas malpli da malsanoj ol normalpezaj homoj, kiuj ne ekzercas.

La demando pri tio, kio estas sana por manĝi finfine temas pri tio, kion por ni signifas sano. Bona manĝaĵo povas en la tuta aŭ proksima tempo esti same ligita al sperto de sano, kiel la deziro eviti

malsanon en la estonteco. Multaj homoj spertas ke ili fariĝas pli viglaj kaj povas pli bone koncentriĝi kiam ili pliigas la kvanton de verdaj kaj fibroriĉaj manĝaĵoj kaj reduktas sukeron. La klarigo estas pure fiziologia – kiam ni manĝas sukeron, ni ricevas rapidan kreskon de sanga sukero kun amasa insulino-respondado kiel rezulto, kio kontribuas al tio, ke ene de kelkaj horoj la sanga sukero akre falas kaj lacigas kaj malvigligas nin. Krome, malsathormonoj estas eksterfazaj, kaj sekve ni manĝas pli kaj tiel fariĝas eĉ pli dormema.

La rolo de manĝaĵo en sano fakte temas multe pli ol tio, kion ĝi enhavas. Manĝaĵo alportas kuniĝon kun aliaj homoj, sed ankaŭ kun naturo. Ĝi markas la ŝanĝojn de la sezonoj kaj vivo. Ĝi povas redukti streson kaj doni al ni plaĉajn spertojn. Kaj krei plenecon en nia vivo. Malgraŭ ĉiuj sankonsiloj kaj studoj, manĝaĵo ne estas medikamento dozinda laŭ protokolo, sed unu el la grandaj ĝojoj de la vivo.

<https://livsstilsverket.se/sv/matens-roll-i-vara-liv>



Ne forgesu viziti la retpaĝaron *Fontoj.net*. Esploru la kolekton de diversaj gravaj tekstoj, kantlibroj, dokumentoj k.t.p. Tie troviĝas i.a. nia gazeto de post la jaro 2000.

## KRISTANAJ FONTOJ

Unua paĝo || A - Z | Adoru | Biblio | Breviero | Meslibro | Traktatoj | Trezorejo |  |  |  | 

Ĉu ... preĝi | mediti | ricevi instigojn || kanti | muziki || informiĝi | legi | studi || prepari Diservon

# Informoj

## Atento

Mi ricevis informon ke baldaŭ la sveda bankokonto de UEA ne plu funkcios (kaj simile en aliaj landoj). En la pasinta numero de Dia Regno mi listigis diversajn pagmanierojn, inter alie svedan plusĝirokonton. Tiu ebleco ne plu funkcios. Necesas pagi laŭ la suba maniero. Mi petas membrojn en aliaj landoj ankaŭ kontroli siajn pagmanierojn, kiam estos tempo por pagi iajn kotizojn.

Membroj povas pagi al **kelk-p** uzante eŭran bankokonton de UEA:  
por sumoj en EUR:

IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64 (ĉe la banko ING)

BIC: INGBNL2A

kontoposedanto: Universala Esperanto-Asocio (Rotterdam, Nederlando)

/Redaktoro

### Listo de aliĝintoj al la kristana kongreso en Vác.

Je la 15a januaro

- |                                    |  |
|------------------------------------|--|
| 1. Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Hungario | 12. Oldřich Arnošt FISCHER, Ĉeĥio        |
| 2. Bengt Olof ÅRADSSON, Svedio     | 13. Gabriella STIER, Rumanio             |
| 3. André ÅRADSSON, Hungario        | 14. Judit OLÁH, Rumanio                  |
| 4. Pavel POLNICKÝ, Ĉeĥio           | 15. Ruth van PUIJENBROEK, Svislando      |
| 5. Philippe COUSSON, Francio       | 16. Jiří STUDENÝ, Ĉeĥio                  |
| 6. Pavol PETRIK, Slovakio          | 17. Pavla STUDENÁ, Ĉeĥio                 |
| 7. Petr CHRDLÉ, Ĉeĥio              | 18. Agneta JÄRLSTRÖM, Svedio             |
| 8. Antal PESTI, Hungario           | 19. Margareta ANDERSSON, Svedio          |
| 9. Marek Dabrowski, Pollando       | 20. Tibor KEPENCAY, Slovakio             |
| 10. Zdeněk Kadlec, Ĉeĥio           | 21. Magnus SUNDMAN, Svedio               |
| 11. Helena Klesová, Ĉeĥio          | 22. Sándor MONOSTORI, Aŭstralio/Hungario |

# Sonu gloro tra l' aer'

(originale verkita en Esperanto)

The musical score is written in 2/2 time with a key signature of one flat (B-flat). It consists of three staves of music. The first staff is in treble clef and contains the melody for the first line of lyrics. The second staff is in bass clef and contains the melody for the second line of lyrics. The third staff is in bass clef and contains the melody for the third line of lyrics. The lyrics are: "So - nu glo - ro tra l' a - er'. Re - gu pa - co sur la ter', en la kor' krist - nas - ka ĝoj'.—". There are four numbered circles (1, 2, 3, 4) above the notes, indicating specific points in the melody. The first circle is above the first note of the first staff. The second circle is above the first note of the second staff. The third circle is above the first note of the third staff. The fourth circle is above the second note of the third staff. The score ends with a double bar line and repeat dots.

So - nu glo - ro tra l' a - er'.  
Re - gu pa - co sur la ter',  
en la kor' krist - nas - ka ĝoj'.—

4-voĉa rondkanto

SONU GLORO TRA L' AER' • M kaj E (originale verkita):  
Albrecht Kronenberger 2021-12-30